Heinrich Heine,

En nord' unu pino en solo

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Iomete ŝanĝita versio

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵ;'
Glacio kaj neĝa tavolo
Ĝin kovras per tomba tolaĵ'.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia
Ĝi estas en orient',
Eterne pri lando alia
Sopiras ĝi en silent'.

Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1023-2074 (2014-05-23 14:39:50)

Mi, Manfred Retzlaff, aliigis en 2014-05-23 la Zamenhofan tradukon tiel, ke la rim-skemo estas la sama kiel en la germana originalo.

Heinrich Heine,

Pinarbo staras sola

tradukita de Friedrich Pillath

Pinarbo staras sola
En nordo sur nuda altaĵ'.
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio
Ĝin kovras blanka litaĵ'.

Sonĝadas ĝi pri palmo
Ĝemanta en orient',
Soleca, sur arda deklivo
En maldolĉega silent'.

Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* FRIEDRICH PILLATH *(†1932-04.03).*

Arg-1023-2287 (2015-03-19 16:43:44)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html`.